## Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ILEI estas la tutmonda organizaĵo por instruistoj – ĉu de Esperanto, ĉu de aliaj temoj. Ĝi havas internaciajn organojn: estraron, komitaton, komisiitojn kaj komisionojn. Sed multe el ĝia laboro realiĝas tra ĝiaj Landaj Sekcioj, kies listigo videblas ĉe <www.ilei.info> kaj fizike sur la dorskovrilo de la unua numero de *Internacia Pedagogia Revuo* ĉiujare. Ĉi tiu dokumento prezentas la petilon per kiu fondita landa organizo povas peti aliĝon al ILEI.

Tiu peto povas veni rekte de nove fondita grupo, sed tipe pli frua paŝo estas la nomigo de Reprezentanto, por kiu la kondiĉoj estas malpli postulaj, kaj por kiu ekzistas aparta petilo. Oni rajtas nomi reprezentanton kiam ankoraŭ ne estas fondita enlande la sekcio. Sed peto pri aliĝo al la internacia sekcio devas okazi post la fondo de la enlanda instanco. Peton nomi reprezentanton decidas la estraro de ILEI, sed peton akcepti sekcion ricevas la estraro kaj decidas la Komitato, kiu estas la supera organo de la Ligo. La ILEI-Komitato normale decidas pri aliĝpetoj en sia konferenco en julio-aŭgusto. Aliĝpetoj plej oportune atingu la Estraron ĝis februaro. Ciferoj en la sekva teksto referencas la Statuton de ILEI (S) kaj ĝia aldona Interna Regularo (R).

### BAZAJ DEVOJ DE SEKCIO kaj SEKCIESTRO

- Sekciestro devas aparteni al la estraro aŭ funkciiga gvidorgano de la sekcio (S 7.3.3), kaj tipe estas ĝia prezidanto, sekretario aŭ kasisto.
- Sekciestro havas trijaran mandaton kaj estas reelektebla. (R 7.3.3.3)
- Kandidata sekciestro devas esti membro de la internacia ILEI en la jaro de la peto-ektrakto, kaj en la tuj antaŭa jaro.
- ILEI direktas ĉiujn informojn al la Sekciestro – plejparte perrete – kaj tiujn por ĝenerala distribuo la Sekciestro devas pluperi al la membroj, kaj al la redaktoro de eventuala Sekcia Bulteno kaj al redaktoroj de aliaj gazetoj aŭ komunikiloj.
- Sekciestro devas sendi al la ILEI-Sekretario raporton minimume unufoje jare pri la laboro de la Sekcio, antaŭ la 31-a de marto (R 7.3.7); tiucele ILEI dissendas raport-formularon.
- Sekcio devas transpagi ĝis la 31a de marto la kotizojn al la internacia ILEI por la kuranta jaro kaj liveri la membroliston al la Sekretario kaj Kasisto de la Ligo (R 7.3.3.4). Sekcioj antaŭvidantaj transpagajn malfacilaĵojn pri tio devas trakti kun la ILEI-kasisto pri eblaj solvoj. En kazoj de limigita pagipovo, petoj por subteno per la Koleghelpa Kaso devas atingi la kasiston kaj sekretarion de la Ligo ĝis la 15a de januaro de la koncerna jaro.
- La sekcio devas nomumi komitatano(j)n por trijara mandato, kies nombro dependas de la sekcia membro-nombro, kiel fiksita en la Regularo de ILEI (R 7.1.2) . La sekciestro zorgas pri atestigo de anstataŭantoj se nomumita komitatano ne povos ĉeesti la kunsidojn.
- La sekcio informiĝas pri ĉia instruado de Esperanto en ĝia teritorio (ne nur de la propraj membroj) (R 7.3.3.5) kaj raportas tion regule al ILEI kaj ĝia partnero <edukado.net>.

Al sekciestroj, kiuj tion petas, ILEI povas disponigi kromajn ekzemplerojn de IPR varbcele. ILEI povas disponigi modelan statuton, preta por modifo laŭ enlandaj bezonoj. La retejo de ILEI proponas plej diversajn gvidilojn kaj reklamilojn, kaj estas je dispono de sekcioj por diskonigi siajn projektojn. La plimulto de la internaciaj membroj de ILEI estas perataj de la sekcioj, sed rektaj individua aliĝado ankaŭ eblas. ILEI disponigas al sekciestroj la plenan liston de membroj ricevita por la koncerna teritorio.

==================================================================

# ALIĜPETO POR LANDA SEKCIO DE ILEI:

Vi rajtas sendi ĉi tiun formularon al ILEI elektronike, sed krome la Sekretario devas ricevi fizikan paperan version, kune kun valida subskribo de la proponata sekciestro.

Ŝtato aŭ teritorio reprezentota: ______________________________________________

Oficiala nomo de la Sekcio en Esperanto: ______________________________________

__________________________________________________________________________

Oficiala nomo de la Sekcio nacilingve: _________________________________________

___________________________________________ La lingvo: _________________

Fondodato kaj loko de la Sekcio: _____________________________________________

Enlanda Membronombro de la Sekcio: __________________________________________

Nombro de internaciaj ILEI-membroj en la teritorio: _______________________________

Devas esti minimume kvin por fondi sekcion (S 7.3.3), kaj devas resti minimume kvin por pluvivigi ĝin.

Urboj aŭ regionoj kun membroj aŭ lokaj filioj: ___________________________________

__________________________________________________________________________

Nomo de ĉefaj oficuloj:
Prezidanto: ______________________________________________________________

Sekretario: _______________________________________________________________

Kasisto: _________________________________________________________________

Sekcia adreso: _____________________________________________________________

Proponota sekciestro por ILEI: _______________________________________________

Adreso: __________________________________________________________________

Statuso de la Sekcio: memstara aŭ ligita kun aliaj E-instanco: _________________________

__________________________________________________________________________

Ĉu ĝi havas juran personecon? Se jes, donu detalojn: ______________________________

Organiza strukturo de la Sekcio: (ĉefaj organoj) ________________________________________

________________________________________________________________________________

Kiu estas la supera organo, kiom ofte ĝi kunvenas? ____________________________________

________________________________________________________________________________

Kiel kaj kiomofte oni elektas la estraron? _____________________________________________

________________________________________________________________________________

Ĉu ĝi estas la sola prieduka Esperanta organizaĵo en la pretendata teritorio? Se ne, bv. detaligi:__

________________________________________________________________________________

(Tio ne estas nepra malhelpo al aligo, sed akceptebla interkonsento devos esti atingita)

☐ Ni aldonas subskribitan petleteron kaj koncizan raporton pri la planata agado de la sekcio, kaj pri la grado de oficaleco de Esperanto-instruado en la lando aŭ teritorio.

☐ La Statuto aŭ gvid-dokumento de la sekcio (aŭ ĝia tegmenta organizaĵo) estas sendota elektronike aŭ fizike al ILEI, kune kun ĉi tiu peto. Bonvolu respondi pri tiom el la sekvaj informoj, kiom eblas:

Dato kaj loko de la kunsido kiu akceptis la statuton: ________________________________

La organo, kiu akceptis la Statuton aŭ gvid-dokumenton: ____________________________

(Se temas pri la fondo-kunsido, kiel raportite supre,sufiĉas indiki tion).

☐ Ni deklaras ke la sekcio estas demokrate organizata kaj funkciigata, kaj ke membreco estas malferma al ĉiuj instruistoj aŭ interesatoj pri edukado loĝantaj en la pretendata teritorio

Petanto(j): ________________________________________________________________

Subskribo de la kandidata sekciestro: ___________________________________________

Loko: _______________________ Dato: ______________________________

============== FINO de la PETILO/GVIDILO ====================

SMG Nov 2010, kun definitivigo Feb 2011.
D:/…/ILEI/SEKCIOJ/ALIGHPETOJ/